Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

Trejnado pri grupa dinamiko

1. Trejnistoj

Karolina Rzeszuto kaj Spencer van der Meulen

2. Aranĝo

La trejnado okazis dum Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Wrocław en Pollado.

3. Lingvo

La lingvo en kiu oni gvidis trejnadon estis esperanto.

4. Agendo

1. Saluton kaj inico
2. Reguloj kaj celoj
3. Ludo
4. Kio estas la grupo?
5. Eta paŭzo
6. Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de teamlaboro
7. Ludo

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

8. Grupa procezo de Tuckman
9. Problemoj kiam oni kreas grupojn
10. Mesaĝa ludo
11. Grupo dinamiko
12. Kelkaj gravaj aferoj en la laboro kun grupo
13. Kiel plibonigi la kvaliton de dinamiko de grupo?
14. Fino kaj rezumo

I. Inico

Ni ekkomenis ekde ti ĉiu citato, kiu bone montris nian temon :

„Neniam dubu pri tio, ke eta grupo da prizorgemaj fervoraj civitanoj povas ŝanĝi la mondon. Ja vere, tio estas la sola afero kiu iam Ajn la mondon ŝanĝis." (Margaret Maed)

II. Reguloj kaj celoj



Ni prezentis niajn regulojn kaj celojn de la trejnado.
Reguloj estis:

1. Ni donu 100 % atento
2. Ni ĉiuj partoprenu por sukcesa trejnado
3. Juĝu ideon, ne personon
4. Ni respektu personajn limojn
5. Ni estas malfermitaj
6. Ni estas kreemaj

Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

7. Demandu
8. Ĉiuj estas mojosaj

Celoj de la trejnado:

- Partoprenantoj scipovas karakterizi la grupo kaj ĝia elementoj kaj samtempe ili komprenas kaj difinias la termon grupo dinamiko.

- Partoprenantoj konas gravajn aferojn en laboro kun grupo. Ili konas problemojn , kiu akompanias dum formado de grupo kaj scias kiel korektigi kvaliton de grupo dinamiko. Ili scias kio kaŭzas bona kaj malbona dinamiko en grupo.

- Ĉeestantoj konceptadas grupa proceso kaj utiligas ĝin en praktiko.

III. Ludoj dum trejnado



- Ludo kun nomoj je komenco – ekkono de partoprenantoj
- Ludo kun ĉapeloj – partoprenantoj lernis pri konstruado de la grupo
- Mesaĝa ludo – partoprenantoj ekzercis grupa procezo en praktiko

IV. Kio estas la grupo?



Ni demandis partoprenantoj kio laŭ ili estas grupo. Partoprenantoj skribis siajn difinojn de la grupo. Poste ni diskutis pri ĝi. Ni prezentis diversajn difinoj de la grupo. Sekve ĉeestantoj ricevis ekzemploj de la grupo kaj ili devis atribui ecoj de la grupo el difinoj al ekzemploj.





Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

Diversaj difinoj:

- **Turner, 1982**

  KATEGORIADO

  Du aŭ pli individuoj… [kiuj] perceptas sin anoj de la sama socia kategorio

- **Frey & Konieczka, 2010**

  KOMUNIKADO

  Tri aŭ pli personoj.. . kiuj (a) pripensas sin kiel grupo, (b) dependas unu de la alia (ekzemple, rilate al komunaj celoj aŭ kondutoj kiuj influas unu la alian), kaj c) komunikas (interagas) unu kun la alia (vid-al-vide aŭ per teknologiaj rimedoj).

- **Bales, 1950**

  VID-AL-VIDE

  Ajna nombro de personoj, kiuj interagas unu kun la alia en ununfoja vid-al-vida kunveno aŭ serio de tiaj kunvenoj.

- **Shaw, 1981**

  INFLUO

  Du aŭ pli personoj, kiuj interagas unu kun la alia en tia maniero, ke ĉiu persono influas kaj estas influita de ĉiu alia persono.

- **Vortaro de psikologio, 2007**

  INTERAGADO

  Du aŭ pli interdependaj individuoj kiuj influas reciproke per socia interagado

- **Williams, 2010**

  GRANDECO

  Du aŭ pli personoj

- **R. Brown, 2010**

  IDENTECO

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

Du aŭ pli personoj, kiuj posedas komunan socian identecon, kaj kies ekzisto kiel grupo estas rekonata de iu ekster la grupo

- **McGrath, 1984**

INTERRILATOJ

Kolekto da du aŭ pli personoj, kiuj en ia grado havas dinamikan interrilaton unu kun la alia

- **Lewin, 1948**

INTERDEPENDECO

Dinamika tuto, kiu baziĝas pli sur interdependeco ol sur simileco

- **Forsyth, 2014**

INTERRILATO

Du aŭ pli da individuoj, kiuj estas ligitaj per kaj ene sociaj rilatoj

Ekzemploj de grupo:



- Familio
- Studentoj, lernantoj
- Laborantoj de sama firmo

- Institucioj
- Membroj de ajna formala aŭ neformala organizo
- Asocioj
- Politika partio
- Armeo
- Lernejo
- Nacio
- Skoltgrupo
- Futbalteamo

V. Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de teamlaboro

Partoprenantoj laboris en du grupoj. Unua grupo okupiĝis pri avantaĝoj kaj dua pri malavantaĝoj. Ili diskutis en siaj grupoj, skribis siajn ideojn sur paperoj kaj poste prezentis kaj ni parolis pri ĝi.

Avantaĝoj:

1. Plibonigo de efikeco kaj produktiveco de laboro
2. Pli multe da kreaj solvoj, reciproka inspirado, kuncerbumado
3. Oni uzas individuaj kapabloj kaj scioj por atingi unu celon
4. Ĉiu povas fari tion, kion li ŝatas, dank' al tio kreskas kontento pri faritaj taskoj
5. Plifortiĝas kuligoj inter individuaj membroj de la grupo, la grupanoj agas kiel kompleta sistemo, ofte aperas amikecaj rilatoj.
6. Lernado de toleremo kaj bonvolemo
7. Reciproka Instruiĝado unu de la alia
8. Plifortigo de egaĝiĝo kaj motivado al laboro
9. Instigo al diskutado kaj strebado al novaj taskoj
10. Instruado de komunikaj kaj sinergiaj kapabloj
11. Pli malofte okazas hazardaj eraroj
12. La grupo helpas reciproke, kune solvas problemojn
13. Dank' al dividigo de laboro estas disigita amasego de devoj kaj respondecoj inter multaj membroj de la grupo. Unu persono de devas fari ĉiun taskon ŝparante tempon kaj energion. Oni povas realigi grandajn projektojn.

Malavantaĝoj:

1. Povas konduki al konformismo
2. Povas aperi la lidero deviganta la aliaj
3. Foje la individuaj membroj de la grupo devas parte rezigni proprajn ambiciojn por atingi la celon de la grupo
4. La grupo bezonas pli multe da tempo por decidi aŭ solvi la problemon ol la individua membro.
5. Ekzistas risko de disigo de la respondeco

Laboro de partoprenantoj:





Je la rezumo de tiu ĉi etapo ni montris ke malgraŭ iuj difektoj, kiuj akompanias dum la kreo de la grupo kaj lia laboro, oni povas konstati, ke homoj kiuj laboras kune kiel unu grupo, ili povas fari aĵojn kiuj ne atingi individue.

Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

VI. Grupa procezo de Tuckman



La grupa procezo de Tuckman konsistas el kvar etapoj:

- **FORMADO**

La grupo estas kreita, ĝiaj taskoj difinitaj, respondecoj priskribitaj.

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

- **ATAKADO**

En la grupo komenciĝas konfliktoj. Membroj de la grupo konkuras pri influoj. Iuj membroj malamikiĝas.

- **NORMIGADO**

La solvo de ĉiuj malkvietaj konfliktoj permesas al membroj de grupo senti sin bone en sia akompano. Grupo atingas senton de unueco. La energio de grupo estas uzata por fari taskon, anstataŭ solvi konfliktojn. Je la fino de tiu etapo la teamo laboras intense, farante kontentigan laboron.

- **AGADO**

Membroj de la grupo laboras tre efike. La teamo rapide solvas problemojn. Specifaj celoj estas atingataj. La teamo rapide progresas por atingi la finan celon.

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

VII. Problemoj kiam oni kreas grupojn

➢ FORMADO

- Malalta nivelo de konfido inter membroj
- Ne ĉiuj membroj de la grupo sufiĉe komprenas la taskojn de la grupo
- Membroj de la grupo estas kutime tro silentemaj, ne esprimas siajn opiniojn, ne demandas.

➢ ATAKADO

- Membroj timas malkaŝitajn konfliktojn kaj ne volas malkaŝe elparoli
- Ofte kaŝitaj konfliktoj blokas la grupon
- Negativaj sentoj malebligas realigon de tasko
- En la grupo estas streĉa kaj maltrankvila atmosfero

➢ NORMIGADO

- Manko de gravaj problemoj

➢ EFIKA AGADO

- La rapideco de agado malaltiĝas pro laciĝo
- Novaj membroj povas elvoki malnovajn konfliktojn

VIII. Grupa dinamiko

Ni montris la kreito de la koncepto de grupa dinamiko – Kurt Lewin. Ni parolis pri tio, ke homoj ofte okupas malsamaj rolojn kaj kondutojn, kiam ili laboras en grupo. Grupa dinamiko priskribas la influon de tiuj roloj kaj kondutoj je aliaj membroj de la grupo.

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

Grupa dinamiko estas la procezo formi homan komunumon, ekde komenco, tra la disvolviĝo, ĝis maturiĝo je la fino.

Kun grupa dinamiko kunligas:

- Determino de celoj de la agado de grupo
- Divido de roloj kaj taskoj Inter membroj de grupo
- Manieroj determini la gvidanton de grupo
- Solvado de konfliktoj en grupo

Sekve ni ekaperis diversajn difinojn de grupa dinamiko.

- Grupoj estas araj estaĵoj, vivantaj sian propran vivon. Grupo ne estas simpla sumo de ĝiaj konsistigaj unuoj (Jedliński , 1997)
- Grupoj ŝanĝas dum tempo (Oyster, 2002)
- Vivo de grupoj, simile kiel homoj, „(…) estas procezo de sencxesaj ŝanĝoj, kiu havas komencon kaj finon (Szmagalski, 1998)
- La procezo de lernado en la laborejo estas strikte ligita kun la dinamiko de grupo, kaj dependas de la fazo de disvolviĝo de la grupo (Bradford 1964, Doroszewicz i Zwoliński, 1980)

Co-funded by the Erasmus+ Programme of the European Union

IX. Kelkaj gravaj aferoj en la laboro kun grupo

- **Celoj** – la grupo funkcias la plej bone, kiam liaj membroj bone komprenas la celon kaj tion, kion ili deziras atingi
- **Bazaj reguloj** – starigu la Bazan regulojn de agafo aŭ proceduro
- **Konscio de grupaj procezoj**- ni ĉiuj ekkonscias la procezoj, kiuj okazas en grupo
- **La plano** – kiel grupo vi devus plani kiel vi atingos celojn
- **Roloj** – identigu klare la roloj de membroj
- **Komunikado** – reciproka respekto, dividiĝo de ideojn

- **Fidindaj informacioj** – kolektu la plej valoraj informoj kiel eble
- **Kunlaboro** – komuna uzo de sperto kaj talentoj de membroj
- **Komuna decidoj** – ĉiuj partoprenas kaj ĉiuj estas respondeca por sukceso de grupo

X. Kiel plibonigi la kvaliton de dinamiko de grupo?

1. Ekkonu vian partoprenantojn
2. Difinu roloj kaj respondecoj
3. Integru teamo

Co-funded by the
Erasmus+ Programme
of the European Union

4. Zorgu pri malferma komunikado
5. Zorge rigardu

Dankon por Via ĉeesto, ĝis revido iam en Esperantujo ☺